# TEA-BULTENO

2ª JARO — JANUARO 1999 — NUMERO 1




## AGENDO



| | | |
|---|---|---|
| **1** | **V** | **Sidejo fermita** |
| 2 | S | |
| **3** | **D** | |
| 4 | L | Konversacia rondo |
| 5 | M | Estrarkunsido |
| **6** | **M** | |
| 7 | Ĵ | |
| 8 | V | Epifanio en TEA |
| 9 | S | |
| **10** | **D** | **Ĝenerala Asembleo de TEA** |
| 11 | L | Konversacia rondo |
| 12 | M | Ordigo de hemeroteko |
| 13 | M | |
| 14 | Ĵ | |
| 15 | V | Rondokato sin prezentas |
| 16 | S | |
| **17** | **D** | |
| 18 | L | Konversacia rondo |
| 19 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 20 | M | |
| 21 | Ĵ | |
| 22 | V | Ekskurso tra vortaro (Medicino) |
| 23 | S | |
| **24** | **D** | |
| 25 | L | Konversacia rondo |
| 26 | M | Ordigo de TEA-arkivo |
| 27 | M | |
| 28 | Ĵ | |
| 29 | V | Prelego pri la movado |
| 30 | S | |
| **31** | **D** | |









## Vortoj de la redakcio

Karaj Tea-anoj kaj Gelegantoj!

Estas preskaŭ deviga tradicio, komenci la unuan numeron de asocia informilo (antaŭe LA ETA GAZETO, nun la tre tre modesta TEA-BULTENO) per jam ofte aŭditaj vortoj, ja ĉiam la kutimaj, sed - kredu! - tute sinceraj: La tuta redakcio plenkore esperas ke la ĵus komenciĝinta nova jaro estu por vi ĉiuj prospera, senproblema, malavara je nur bonaĵoj, sukcesa kaj paca!

Ĉi tiu modesta monataĵo eniras sian duan vivojaron. En la paso de la unua, ĝi iĝis nek plurfolia nek pli enhavoriĉa - do nenia progreso - tamen ke ĝi intertempe ne malaperis, ja tio estas sukceso. Tio signifas, ke malantaŭ ĝi staras homoj kiuj ankoraŭ havas iajn volon kaj emon daŭrigi la asocian agadon.

Ĉi-monate, dimanĉon la 10^an^, okazos la Ĝenerala Asembleo de asocianoj dum kiu oni ekzamenos pli detale (kaj pritaksos) la aktivadon de TEA en la pasinta jaro. Espereble vi nombre ĝin ĉeestos, ĉar grava estas via partopreno, kiom same grava estas via daŭra engaĝiĝo por la antaŭeniro de **nia** lingvo pere de **via** Triesta Esperanto-Asocio.

Ni do atendas vin, sed ne nur okaze de la ĉiujara kunveno sed konstante, dum la tuta jaro, por kune disvolvi la laboron cele al nia komuna afero.

## Ordinara Asembleo de TEA

La Ĝenerala Asembleo de la membroj de TEA okazos dimanĉe la 10an de januaro 1999 je la 10a horo en unua kunvoko kaj respektive je la 10.30 en dua kunvoko. Ĉi lasta validos kun kiu ajn nombro de partoprenantoj.

### TAGORDO

1. Elekto de la prezidanto kaj sekretario de la asembleo.
2. Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa jarkunveno.
3. Raportoj pri la agado dum la jaro 1998.
   a) Morala raporto de la prezidanto *(E. Ackermann)*
   b) Agadraporto de la sekretario *(E. Doerfler)*
   c) Financa kaj bilanca raporto de la kasisto *(G.Valle)*
   ĉ) Deklaracio de la revizoroj *(A. Zerpini - E. Nocent)*
   d) Raporto de la triesta katedro *(E. Doerfler)*
   e) Raporto pri la libro-fako *(G. Valle)*
4. Elekto de la balot-komisiono.
5. Voĉdonado por la elekto de estraranoj kaj revizoroj.
6. Diversaĵoj (pritraktotaj dum kontrolo de la balotiloj).
7. Anonco de la rezultoj de la voĉdonado.

# Tie kaj tie pluketante...

Zorge de Elda Doerfler

## Surprizaj tradukaĵoj

*(parte eltirita el IL MESSAGGERO - dec. 1998)*


Pli kaj pli aperas en la ĉiutagaj ĵurnaloj aŭ semajnaj revuoj artikoloj pri komunikadaj lingvoproblemoj aŭ pri la diversaj sistemoj eltrovitaj por tion solvi. En nuna, moderna tempo per la grandiozaj evoluaj progresoj de la teknologio, la homo estas malŝarĝita je plej diversaj manlaboroj kaj sekve lia vivo plisimpliĝas. Ĉefe tiel estas en la informadika kampo. Mi citu Interreton, kiu estas aŭtentika fonto, preskaŭ neelĉerpebla, de informoj en ĉiu kampo de la homa scio. Por italaj interretaj navigantoj tamen povas ekesti problemoj pro la anglalingva redaktado, sed nun ili ne plu timu, ĉar jen eltrovita la solvo: samtempa tradukado de ALTAVISTA, aŭtomata tradukilo kiu, kelksekunde, transformas la anglan tekston en la italan. Subkomprenite tamen, ke, ĉar malantaŭ ĝi ne staras homo, ĝi tradukas laŭ propraj kapabloj, ĉu ne? Do, la rezultoj ne estas tiel miraklaj kiel oni povus atendi.

Jen ekzemplo: en Interreto aperas, liverita de la teatro *La Scala* (Milano), biografio, en la angla, pri ĝia muzikdirektoro Riccardo Muti. Inter la pluraj stumbletoj (aŭ stumblegoj), elstaras: «En 1994 li inaŭguris *La Scala*-n per la kubo *Walküre*, en 1995 per la kubo *Zauberflöte*». Do, ŝajnas ke Valkirio kaj La Magia Fluto estas iuj kuboj (ĉu ĵetkuboj aŭ buljon-kuboj?). Tiele, ĉar la oper-titoloj estas en la originala lingvo: la aŭtomata tradukilo miskomprenis la germanan artikolon *die* kiel anglan substantivon, kiu en tiu lingvo signifas «kubo».

Pli poste ĝi informas ke «Muti direktoris la 150-datrevenan koncerton de la kolbaso *Philarmoniker*». Kial? Ĉar la fama orkestro *Wiener (Philarmoniker)*, anglen tradukita, fariĝas simpla porka farĉaĵo. Kaj ankoraŭ: Ĉu rekoneblas, sub ĉi tiu formo, la titolo de fama opero de Mozart: «Vestiĝas Johano» (Donjuano)? *Don* en la angla - surmeti ion. Kaj laste: «Muti estris 1993 Novjarajn koncertojn».

Nu, longan vivon al la eminenta orkestrestro, sed ĉu la samon ni deziru al ĉi laste eltrovita hom-anstataŭilo?

**Atentigo!**
Nova jaro komenciĝis kaj ni pretiĝas por vigle alfronti la estontajn defiojn por plenumado de la celoj de KAMPANJO 2000. Klopodu propagandi nian lingvon, varbi novajn anojn, kaj - ne laste - bonvolu esti akurataj en la pago de la jara membro-kotizo, kio multe helpos al la agadplanoj de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO.



## DELEGILO

La asociano ______________________

estas delegita anstataŭi min ĉe la Jara Asembleo de TEA, okazonta la 10^an^ de januaro 1999.

Subskribo ______________________

Dato ______________________



## Zamenhof-Tago en Triesto

Ne estas nia kutimo aperigi raportojn pri unutagaj aranĝoj organizitaj de Tea, sed ĉi-foje rakontindas la festo honore al nia Majstro. Bela vetero permesis promenado ĝis la preĝejo, kie pastro Ammer celebris esperantlingvan Diservon. Akompanadis ĝin dolĉaj kaj kortuŝaj Kristnaskaj kantoj, per la vibrantaj voĉoj de la vere plaŭdinda virina koruso *Ivan Grbc*.

Post tio tuj al klubejo, por festena bufedo, kies pinta ero estis la Gastronomia Konkurso. Unu post la alia surtabliĝis 9 diversaj pladoj, ĉiuj numeritaj. Pli ol 30 personoj estis dum longa tempo tre okupataj: kaj por frandi bongustaĵojn kaj por atribui, per slipoj, poentojn al la preferita plado. La konkurso plensukcesis, kaj donis kontentigon kaj al la eminentaj kuiristoj (ĉi-foje nur inaj) kaj al la tutsatigitaj gastoj. Unua premio al Laura, pro FARĈITAJ DAKTILOJ; dua premio al Cristiana, pro SALATO KUN MAJONEZO; tria premio al Lida, pro FROMAĜA ENVOLVAĴO. Sed, sincere dirite, ĉiuj meritis premion, kaj tiel estis, fakte. Sekvis tion memoriga parolado kaj deklamo de tre delikata Zamenhofa poeziaĵo, ne tiom konata: PLUVO. Post la solenaĵo, Anita revivigis, pere de diapozitivoj, la okazintajn aranĝojn de nia asocio, ekde 1967 ĝis la nuntempo. Ankaŭ tiu ĉi parto estis tre aprecata: belaj kaj gajaj rememoroj pri okazaĵoj kaj personoj, nostalgio pri pasinteco kaj pli juna aĝo, sed multe da ĝojo ĉar pluraj el tiuj estas ankoraŭ kun ni por... kuraĝe iri antaŭen!



## Novaĵo

Ĉiumonate, vi trovos aldonon, kiu, monato post monato, priskribos la ĉefajn festotagojn laŭ Budhismo, Hebreismo, Hinduismo, Kristanismo kaj Islamo. Bonvolu noti ke kelkaj datoj indikotaj kaj iuj celebrad-formoj povas varii de unu popolo al alia, de unu lando al alia, kaj ke ĉi tiu kalendaro, kiu kompletiĝos fine de la 1999^a^ jaro, baziĝas sur la suna jaro.
Ni varme esperas, ke vi trovu ĉi tion interesa, kvankam etforme, kaj ke ĝi stimulu vian emon pliprofundigi viajn konojn pri la tradicioj, ritoj, ceremonioj de aliaj religioj.

## Esperanta Turisma Societo Ljubljana

Tavĉarjeva 2 - 1000 Ljubljana

**Januara programo**
Ĉiuĵaŭde je la 19.30 horo

| | |
|---|---|
| **07.01** | Sen programo |
| **14.01** | Hispanio en diapozitivoj |
| **21.01** | Lingva vespero |
| **28.01** | El Esperanto-gazetoj |


BULTENO de la membroj de
TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
**Sidejo**: Via Crispi 43 - 34125 Trieste
tel/fakso: +39 040 763128; reto: nored@iol.it
**Poŝta adreso**: CP 601 - IT-34100 Trieste Centro
Poŝtĉekkonto N° 10834349

# JANUARO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | 4 | 11 | 18 Aid el Fitr | 25 |
| Mardo | | 5 | 12 | 19 | 26 |
| Merkredo | | 6 Epifanio Teofonia Kristnasko (kopta) | 13 | 20 | 27 |
| Ĵaŭdo | | 7 Kristnasko (Ortodoksa) | 14 Novjartago (kopta kaj Ortodoksa) / Sankrati Ponal / Laylat al- Kadr | 21 | 28 |
| Vendredo | 1 Novjara Tago / Cirkumcido (Ortodoksa) / Shogatsu | 8 | 15 | 22 | 29 |
| Sabato | 2 Shogatsu | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Dimanĉo | 3 Shogatsu | 10 Internacia Tago de Homaj Rajtoj | 17 | 24 | 31 |


# JANUARO 1999

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Lundo | | 4 | 11 | 18 Aid el Fitr | 25 |
| Mardo | | 5 | 12 | 19 | 26 |
| Merkredo | | 6 Epifanio Teofonia Kristnasko (kopta) | 13 | 20 | 27 |
| Ĵaŭdo | | 7 Kristnasko (Ortodoksa) | 14 Novjartago (kopta kaj Ortodoksa) / Sankrati Ponal / Laylat al- Kadr | 21 | 28 |
| Vendredo | 1 Novjara Tago / Cirkumcido (Ortodoksa) / Shogatsu | 8 | 15 | 22 | 29 |
| Sabato | 2 Shogatsu | 9 | 16 | 23 | 30 |
| Dimanĉo | 3 Shogatsu | 10 Internacia Tago de Homaj Rajtoj | 17 | 24 | 31 |

### 5759 Hebrea jaro

### 2559 Budhista Jaro

**1-3** - Shogatsu (novjartago en Japanio).
La budhanoj rememoras la naskiĝtagon de Budho, plej probable en la jaro $560^{a}$ a.K. Dum la festotago, ĉe familioj, surtabliĝas tradiciaj manĝaĵoj, kiuj konsistas el dekdu rizo-buletoj, simbolantaj la monatojn de la jaro, kaj longaj rubandospagetoj, reprezentantaj la longvivecon. Antaŭ la noktomezo de la $31^{a}$ de decembro, en la temploj tintas 108 sonoriletoj cele al forigo de la pasioj kaj iluzioj, kiuj naskas doloron. La geinfanoj ludas per kajtoj kaj ricevas donace monerojn.

### 2054 Hinduisma jaro

**14** - Sankrati Pongal. Unua tago de la favora periodo. Miloj da hinduoj mergiĝas en la sanktan Gangon aŭ en aliajn riverojn por la puriĝaj ritoj.

### 1999 Kristana jaro

**1** - Novjar-tago. Por parto de kristanoj la datado de la jaro ekas de la naskiĝtago de Jesuo Kristo. Konvencie oni ĝin festas la unuan de januaro.
**1** - Cirkumcido de la Sinjoro (Ortodoksa). Oni rememoras tiun riton kaj la donadon de la nomo, Jesuo.
**6** - Epifanio (Anglikana, Katolika, Luterana). Memore pri la vizito de la Tri Reĝoj al la Infano Jesuo.
**6** - Teofania (Ortodoksa). Konsekrado de la akvo kaj kulmino de la kristnaska festado.
**6** - Kristnasko (Kopta). Naskiĝtago de Jesuo Kristo.
**7** - Kristnasko (Ortodoksa). Naskiĝtago de Jesuo Kristo.
**14** - Kopta kaj Ortodoksa Novjar-tago.

### 1419 Islama jaro

Ramadan - La naŭa monato de la Islama jaro, dum kies ĉiuj taghoroj oni devas strikte fasti. Tiu periodo daŭras 30 tagojn. En 1998 ĝi komenciĝis la $20^{an}$ de decembro.
**14** - Laylat Al-qadr. Dum nokta preĝado oni solene memoras la unuan revelacion de la Korano.
**18** - Aid El Fitr. Ĝi anoncas la finon de Ramadan-periodo. En tiu tago oni feste kunvenas por tagmanĝo kun geamikoj kaj parencaro kaj tiam oni interŝanĝadas bondezirajn mesaĝojn, dum la infanoj ricevas donacojn kaj monon.


### 5759 Hebrea jaro

### 2559 Budhista Jaro

**1-3** - Shogatsu (novjartago en Japanio).
La budhanoj rememoras la naskiĝtagon de Budho, plej probable en la jaro $560^{a}$ a.K. Dum la festotago, ĉe familioj, surtabliĝas tradiciaj manĝaĵoj, kiuj konsistas el dekdu rizo-buletoj, simbolantaj la monatojn de la jaro, kaj longaj rubandospagetoj, reprezentantaj la longvivecon. Antaŭ la noktomezo de la $31^{a}$ de decembro, en la temploj tintas 108 sonoriletoj cele al forigo de la pasioj kaj iluzioj, kiuj naskas doloron. La geinfanoj ludas per kajtoj kaj ricevas donace monerojn.

### 2054 Hinduisma jaro

**14** - Sankrati Pongal. Unua tago de la favora periodo. Miloj da hinduoj mergiĝas en la sanktan Gangon aŭ en aliajn riverojn por la puriĝaj ritoj.

### 1999 Kristana jaro

**1** - Novjar-tago. Por parto de kristanoj la datado de la jaro ekas de la naskiĝtago de Jesuo Kristo. Konvencie oni ĝin festas la unuan de januaro.
**1** - Cirkumcido de la Sinjoro (Ortodoksa). Oni rememoras tiun riton kaj la donadon de la nomo, Jesuo.
**6** - Epifanio (Anglikana, Katolika, Luterana). Memore pri la vizito de la Tri Reĝoj al la Infano Jesuo.
**6** - Teofania (Ortodoksa). Konsekrado de la akvo kaj kulmino de la kristnaska festado.
**6** - Kristnasko (Kopta). Naskiĝtago de Jesuo Kristo.
**7** - Kristnasko (Ortodoksa). Naskiĝtago de Jesuo Kristo.
**14** - Kopta kaj Ortodoksa Novjar-tago.

### 1419 Islama jaro

Ramadan - La naŭa monato de la Islama jaro, dum kies ĉiuj taghoroj oni devas strikte fasti. Tiu periodo daŭras 30 tagojn. En 1998 ĝi komenciĝis la $20^{an}$ de decembro.
**14** - Laylat Al-qadr. Dum nokta preĝado oni solene memoras la unuan revelacion de la Korano.
**18** - Aid El Fitr. Ĝi anoncas la finon de Ramadan-periodo. En tiu tago oni feste kunvenas por tagmanĝo kun geamikoj kaj parencaro kaj tiam oni interŝanĝadas bondezirajn mesaĝojn, dum la infanoj ricevas donacojn kaj monon.